

P. 13-14 u 28

bulgara esperantisto

MONATA REVUO

OFICIALA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Rekom. de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II, 1938

Adreso: Car Kalojan 20 — Sofia


3-4

JARO XXIII

S O F I A

Marto—Aprilo 1942

BILDOJ EL BULGARUJO



Lago sur monto Pirin

SENINTERROMPA STREĈO DE LA FORTOJ

La socia kaj teknika evoluo de la homaro preparas por la konsternitaj observantoj de la okazaĵoj neimgeblajn surprizojn. Spite al niaj revoj kaj esperoj pri justeco kaj frateco, pri konkordo kaj homamo, nia malfeliĉa homaro kvazaŭ marŝas senhalte al ia stato de senĉesa universala plago. Ĝia historio kvazaŭ eniris en fazon de senhaltaj obstinaj bataloj kaj de mortigaj psinozoj. Rasoj kaj popoloj sin ekstermas reciproke, gentoj neniigas unu la alian. Tiu ĉi dezertiga kataklismo minacas forbalai desur la surfaco de la tero tutan restaĵon, ĉiun postsignon de kulturo aŭ civilizacio kaj revenigi la homaron en la staton de la primitiva sovaĝeco.

Similaj malesperigaj meditoj kapablas ŝanceligi eĉ la plej fortan kredon, eĉ la plej kuraĝan esperon de niaj verdaj pioniroj. Kion signifas niaj noblaj ideoj homaranaj, niaj virgaj songoj pri amo kaj frateco — apud la kruela historia realismo? Kion povas fari niaj nudaj manoj kaj niaj belaj paroloj kontraŭ la malfermitaj buŝoj de la kanoj kaj de la mitraliloj? Ĉu ne estas pli prudente kapitulaci senkondiĉe, anstataŭ ol elspezi niajn fortojn, eĉ oferi nian vivon por nimeroj kaj fikcioj? Nia plej konvena pozicio en la nunaj cirkonstancoj devus esti la rezigno, kaj „la bona konduto“ ordonas al ni apostatitan plej altan idealon. **Dio Marso ne parolas Esperanton!**

Tial multaj personoj, vidante la nestabilecon de la nuna politika situacio, penas diveni la finan rezulton de la konflikto, por rapide readaptiĝi al la novekreota socia ordo en kiu, pensas ili, venos pli favoraj kondiĉoj por esperantista agado. Ĝis tiam ili preferas forviŝiĝi el la areno de la kultursocia vivo kaj pasive atendi la „miraklon“ ... Ili do adoptas la taktikon de pasiva atendado, observado kaj studado de la cirkonstancoj. Tamen tiuj ĉi „ruzuloj“, penante elprofiti la okazaĵojn, mem kaptiĝas en ties reton. Ĉar ilia kalkulo baldaŭ montriĝos erara. Efektive, tiu ĉi

konduto perdigas al ili la personan iniciativon, la forton de la karaktero kaj fine ilian spiritan fizionomion kaj individuecon. Ili neniam kuraĝas naĝi kontraŭ la fluon de la malfavoraj cirkonstancoj, de la publika opinio aŭ de la ĝenerala pensmaniero — eĉ kiam tiu ĉi fluo estas hazarda, erara aŭ danĝera, eĉ kiam ĝi puŝas ilin al pareo. Anstataŭ ol provi la efikon de sia penso kaj de sia volo sur la ŝancela marŝo de la okazaĵoj, anstataŭ ol influi kaj bridi la kapricojn de la „sorto“ pere de siaj konstruaj ideoj, planoj kaj konceptoj — tiuj ĉi sinjoroj preferas iĝi ludiloj de la hazardo, obeemaj servistoj de la blindaj cirkonstancoj kaj marionetoj movigataj de fremdaj, ofte malpuraj manoj. **Naŭva oportunismo!**

Tia oportunismo estas egale erara kaj danĝera. Erara — ĉar ĝi esceptas el la kalkulo la efikon de la homa faktoro, la personon kaj la volon de la inteligenta kaj celkonscia persono; danĝera — ĉar ĝi neniigas en ni ĉian emon al batalo kaj rezisto, tentante nin al tuja kaj senkondiĉa kapitulaco antaŭ la malfavoraj cirkonstancoj.

Observante kun haltigita spiro la rapidan evoluon de la okazaĵoj, multaj esperantistoj, viktimoj de similaj oportunistaj meditoj, sin demandas, antaŭ ol decidi pri sia plua konduto kaj agado: — Kia do estos la solvo, la „malligo“ de tiu ĉi sanga teatraĵo? Kiu gajnos la venkon kaj kiu diktos sian volon al la tuta homaro?

La orakolo silentas. Tamen, estante nek orakolo, nek profeto, oni povas aserti senhezite:

— **La venkon en la nuna grandioza batalo gajnos ni, esperantistoj!** Nia movado fine diktos sian volon kaj sian pacon al la venkita mondo, liberigonte la homaron el tiu ĉi apokalipsa plago.

Kaj tiu ĉi aserto estas nek vana bondeziro, nek printempa revo de deksesjara knabino. Ĝi baziĝas sur neflekseblaj teleologiaj imperativoj kaj sur

detala kaj kritika analizo de la lastaj historiaj okazintaĵoj.

Prave, por nia pachtalo ni utiligas nek bombojn, nek kanonojn nek mitralilojn; prave, **la lingvo estas nia sola batalilo** kontraŭ la mallumaj fortogoj en la mondo. Sed plej ofte tiu ĉi nemateria batalilo montriĝas pli efika ol la longdistanca artilerio kaj ol la pezaj bombardaj flugmaŝinoj. Ja la mildaj paroloj de la unuaj kristanoj fine venkis la ferajn lancojn kaj kirasojn de la romaj centurioj, kohortoj kaj legioj. En tiu epoko ne ekzistis sur la terglobo ŝtato pli potenca ol la Roma Imperio. La tuta civilizita mondo apartenis al Oktavo Aŭgusto: Hispanujo, Galujo, Egiptujo, Mizio kaj Panonio troviĝis sub lia scepro. Post lia morto la Imperio daŭrigis sian kreskadon. Ne ekzistis en la mondo ia ajn materia forto aŭ armilo, kiu povus kontraŭstari tiun gigantan, nevenkeblan fortikaĵojn. Tamen la parolo — la lingva armilo de la fruaj kristanoj — sukcesis fandi la metalan forton de la armeo, ŝanceligi la potencon de la cezaroj kaj fine triumfi en la centro mem de la Imperio. Nek Pontius Pilatus, prokuratoro de Tiberio, nek la estroj de la farisea partio konjektis la miraklan efikon de la vivanta parolo: ili naive kredis, ke la „afero“ povis esti likvidita per la simpla mortigo kaj malhonorigo de ĝia aŭtoro. Tamen ili trompiĝis: la mortigitoj „reviviĝas“! La disĉiploj de la Viktimo diskonigis tra la tuta mondo liajn vortojn kaj predikojn, kiuj enradikiĝis en la korojn de liaj „samideanoj“ kaj unuigis ilin en kompaktan mason, kian povis kontraŭsrari nenia materia forto. La paroloj, aŭdeblaj esprimoj de ankoraŭ malpli materiaj esencoj — la ideoj — posedas grandan kreopovon kaj konstruan kapablon. Ekzistas ankoraŭ miloj da ekzemploj kiuj pruvas, ke la ideoj estas nevenkeblaj kaj ke la lingvo, **la parolo estas pli fortika batalilo ol la ŝtalo aŭ la pulvo.**

Estas do nenia kaŭzo por hezito aŭ dubo pri la triumfo de Esperanto. Samkiel la predikoj, la flamaĵoj de

la iamaj apostoloj de Kristo renversis la putrajn fundamentojn de la kaduka tiama mondo kaj konstruis novan mondon, kiu daŭris du mil jarojn, samtiel la ideoj kaj la vortoj de niaj Esperanto-apostoloj, kvankam mallaŭte flustrataj de orelo al orelo, silentigos la tondregon de la grenadoj kaj triumfos super la agonianta nuntempa civilizacio. **La nova evangelio de la espero** baldaŭ inundos la homaron.

Nia Esperanto-movado ludos decidan rolon por la repacigo de la mondo post la milito. Eĉ dum la milito la esperantismo fariĝos la sola morala rifuĝejo kaj haveno por ĉiuj noblanimaj idealistoj, vadantaj sur la margeno de la plago. Car, restante politike neŭtrala kultura movado, nur ĝi povos forigi la materialan kaj spiritan malekvilibron, kiu malpacigas la mondon. Ĝian moralan aŭtoritaton rekonados ĉiam pli kaj pli vastaj popolamasoj — ĉu esperantisiaj aŭ ne — ĝis la tago kiam la popoloj, frapitaj terure de siaj propraj krimoj, komprenos sian eraron kaj senkondiĉe venos viciĝi sub la ombro de la verda standardo. Tiam nia movado ludos por la homaro saman renovigan, repacigan kaj rekonstruan rolon, kian ludis la kristanismo dum la grandaj militiroj de la romaj imperiestroj, aŭ dum la teruraj plagoj de la mezepoka interregno en Eŭropo.

Sed, por iĝi kapabla je tia grandioza misio, nia movado devas esti interne forta kaj unueca. Ni devas precipe prizorgi nian disciplinon kaj solidarecon. Tie ĉi evidentiĝas la **absoluta neceso de interna organiza laboro**. Ciu neorganizita homamaso, eĉ se ĝi ŝajnas konsiderinda laŭ la nombro, la riĉaĵo aŭ la kuraĝo de siaj membroj, estas jam anticipe kondamnita al pereco: ĝi ne povos kontraŭbatali kaj rezisti la puŝon de iu ajn organizita malplimulto, kiu facile ĝin disfalis, submetos kaj eks-terms. Multaj esperantistoj nun deflankiĝas de la movado, kredante, ke ili estos pli sekuraj kaj pli fortaj, se ili estos solaj. Ili tamen restos sen ŝirmo kaj sen protekto. Dum tagoj de universalaj kataklismoj kaj sangversaj psi-

ĥozoj, kiam ĉiu aparta persono serĉas okazon kaj eblecon aliĝi al iu kolektiva organismo por pli efika interhelpo kaj interdefendo, la tiel nomata „splendid isolation“ de kelkaj strangaj individuallistoj estas danĝera lukso. La nuna milito, kune kun la grandaj mizeroj, malfeliĉoj kaj detruoj, donos al la homoj utilan lecionon: ĝi devigos ilin forlasisian dolĉan inertecon kaj instruos al ili la neceson de solidareco, disciplino kaj senhalta fortostreĉo.

Ni devas konstante memori, ke la vivo ekzamenas nin ĉiutage. Ciomomente la dioj elprovas nian karakteron kaj niajn kapablecojn, nian volon kaj kuragon. La historio de la homa gento estas longa ĉeno da tiaj ekzamenoj kaj elprovoj, el kiuj ni vidas, ke la fortaj karakteroj, se ili persistas en sia fortostreĉo kaj penado, finfine sukcesas submeti la drakon Hazon kaj jungi la kapricojn de la okazaĵoj en la kaleson de sia penso kaj de sia volo.

D-ro St. Ĝuĝev

ELEKTITAJ PAĜOJ EL LA BULGARA LITERATURO

BOGDAN OVESJANIN

DU BIRDOJ

Ĉe la fenestro estis kantobirdo en kaĝo. Kiam somere en la arboj ekfluís verda juna sango kaj el la branĉoj fontis etaĵburĝonoj, oni elportis la kaĝon en la korton. La birdo tiam lavis siajn okulojn per suna lumo kaj mire rigardis la novan mondon. La burĝonoj grandiĝis kaj la sekvantan tagon ĝi vidis milojn da koloraj sonoriletoj luliĝantaj. Unuj estis blankaj, aliaj bluj, flavaj kaj ruĝaj. Ili sonorís, kvazaŭ ĉiuj tagoj estis festaj kaj al la birdeto ŝajnis, ke la abeloj lulas la delikatajn sonoriletojn. Sur la stratoj marŝis infanoj kantantaj:

«Ĝojas kaj gajas la koro,
Ĉar la printempo ekfloris!»

En la blua ĉielo flugis nigraj krucetoj, altenleviĝis, poste turniĝis kaj malsuprenfalís, disŝprucigante la helan aeron.

— Ĵipĉif-ĉip, ĵi-ĵi-ir! — ridis la gajaĵ hirundoj. La birdeto rigardis ilin mire kaj ne komprenis ilian ĝojon. Ĝi naskiĝis en kaĝo kaj imagis al sí nenion pli belan ol starí post la krado kaj ricevi ĉiu matene grajnoj kaj akvon. Infano manplaŭdis gaje, kiam ĝi kantís, kaj tio igis ĝin esti fiera kaj kontenta.

Aŭtune ĝi vidís, kiel la hirundoj kunvenís sur la telegraffadenoj kaj tutajn tagojn diskutís, kion fari. Poste ili flugís are kaj malaperís trans la bluj montoj. Post ili forflugís la grupoj.

— Al sudo! Al sudo! — ili kriís.

Baldaŭ la arboj iĝis malgajaĵ kaj la folioj ne bruís. Pro la frosto ili ruĝiĝis aŭ flaviĝis. La birdo aŭdis ilin paroli:

— Kial ni ne estas birdoj, por forflugi tien?

Poste la tero iĝis blanka kaj la kaĝo ne forlasis la ĉambron.

Tiel pasís multaj tagoj.

Venis nova printempo, novaĵ varmaj tagoj, aŭtuno, vintro. La birdo vivís feliĉa en sia eta kaĝo kaj kantís siajn malnovajn kantojn.

Iun vintron okazís io eksterordinara. Pasero eniris an la ĉambron kaj la mastro kaptís ĝin.

— Ni metu ĝin en la kaĝon, du birdoj kantos al ni — dirís lia edzino.

La timiĝita pasero rigardís ĉirkaŭ sí. Ĝi ne volís kredi sin kaptito kaj freneze sin sagís al la fenestro. Ĝia kapeto frapis sin sur la feraĵ vergetojn de la kaĝo. Duonsvene, ĝi lerte saltís sur siaĵ piedoj kaj ree puŝiĝis. Ĝi duobligís siajn fortojn. Ŝajnis al ĝi, ke la vergetoj balanciĝas kaj, se ĝi havus ankoraŭ ereton da forto, ĝi sukcesus forflugi.

— Helpon! — ĝi kriís.

Sed helpo ne venís. La kantobirdo timiĝite kaŝís sin en anguleton kaj kun teruro rigardís la ribelan rabiston, kiu volís rompi la ferojn de ĝia kaĝo.

— Helpon! — ree la pasero ekkriis.

Plurajn fojojn ĝi puŝiĝis sur la feraĵn vergojn, falis kun sanga beko, sed, reakirinte iom da forto, ĝi ĵetis sin denove al la krado. Fine ĝi falis kun senpovaj flugiloj. Tiam ĝiaj okuloj trafis la kantobirdon. La pasero je unua fojo vidis ĝin.

— Vi kiu estas?

— Mi loĝas ĉi tie — respondis la eta kantisto.

— Kiam oni kaptis vin?

La birdo ne sciis, kion respondi.

— Mi naskiĝis kaj kreskis ĉi tie — ĝi diris — kial Vi volas forflugi? Ĉi tie oni donas manĝon kaj vintre estas varme.

La pasero rigardis ĝin malŝate.

— Ĉi tie! Resti en ĉi tiu malliberejo! Neniam!

La sekvantan tagon la batalo renoviĝis.

Ekstere flugis paseroj, haltis ĉirkaŭ la kokinoj kaj, kvankam la koko ilin pelis, ili sukcesis forŝteli po kelkaj grajnetoj. Poste ĝoje ĉirpis sur la tegmento:

— Ĉik-ĉirik!

— Ĉik-ĉirik! — respondis la mallibera pasero. Ekstere estis vintro, malvarma, frosta vintro, sed la paseroj estis liberaj kaj ĝojis.

BOGDAN OVESJANIN

LEVSKI PAROLAS:

En mia voj' ne konas limon mi,
mi nek estimas mastron, nek tiranon:
se trafos perd' — nur min koncernos ĝi,
sed gajno estos tutpopola gajno.

Por kio viví ĉiam en sklaveco,
por kio do juneco en katenoj?
Plí bone mortí en batal' kun pret',
kun forta kredo, ke liber' alvenos.

Post veno de l' liber' en nia land'
kor' mia tutan mondon ĉirkaŭvagos
kaj, kie regas mastro kaj tiran',
popolojn sklavaĵn al ribel' vokados.

Surttere ĉiu ŝtono, ĉiu herb'
kaj ĉiu kampa birdo sub la suno —
ĵa ĉiu rajtas eron da liber',
nur la popol' bulgara ĝin ne ĝuas.

La koro de la eta malliberulo sangis.

— Liberaĵ! Kio estas libero? — demandis la kantobirdo.

Tiam la pasero rakontis al ĝi pri la herboriĉaj verdaĵ kampoj, pri la granda arbaro, kie kreskas fragoj kaj filiko, pri la viola ĉielo, kie oni povas libere flugi, kie ĉiu devas zorgi pri sia pano, sed ĉiu estas libera viví laŭ sia volo. La birdo aŭskultis ĉion ĉi kiel fabelon. Ĝi neniam svingis siajn flugilojn, ĝi neniam flugis kaj ne sciis, kio estas libero.

Eksfere neĝis. La blankaj steletoj gluiĝis sur la vitrojn, iĝis larmoj kaj mal-suprenfalís.

— Nun ekstere estas malvarme kaj mankas nutraĵo, sed niaj kamaradoj estas gajaj. Bela estas la vivo en libero.

La pasero ĵetis sin al la krado kaj falis sangigita. Ĝi ne volis manĝi. Ĝis la lasta momento ĝi batalis kaj, kiam ĝi falis senviva, la kantobirdo por unua fojo ekploris.

La sekvantan tagon ankaŭ ĝi komencis puŝiĝi en la feraĵn vergojn.

Ankaŭ ĝi volis esti libera.

El la bulgara trad.:
D. S. Lumianov

Ĉu rajtas la tirano kun malic'
en ĵugon ĵungi fratojn malliberaĵn?
Ja sub ĉielo sama vivas ni —
ni ĉiuj idoj de l' patrino tero.

Tiel parolas Levski en la noki'
al montaranoj krudaj kaj malkleraj
kaj lia flama kaj viviga vori'
en koroj vekas amon al libero.

Se trafos perd' — nur min koncernos ĝi,
sed gajno estos tutpopola gajno.
Voj' sola, fratoj, brilas antaŭ ni:
ĝis fin' batal' kuraĝa kaj kun flamo.

Ni ĵuru antaŭ tiu ŝtala glav'
je nia sang' bolanta en la koroj,
ke pretas mortí ĉiuj ni kun brav',
sed vero kaj liber' sur ter' ekfloros.

El la bulgara tradukis:
D. S. Lumianov

JORDAN STRATIEV

LA NIGRA DOMENO

Min kiu spionas tra l' nudaj festhaloj?
 El turoj de l' urbo meznokto sanoras,
 La vitrojn sonigas klakad' de sandaloj,
 Kaj kreskas minace fantom' senkolora.

Ŝi venas. O, ŝiaj okuloj! Mi tremas.
 Etendas ŝi super mi manon mortulan,
 Kaj, pala, senpova, mi vidas: la gemo
 De mia fianĉa ring' sur ĝi ekbrulas.

Do kie mi estas? Ĉu falas krepusko?
 Sur murojn obskuro glacía timpanas.
 Min ĉiam paĝioj proksimaj emburkas.
 La masko grimace, minace rikanas.

Tradukis: *Al. Kurtev*

ORIGINALAJ VERKOJ EN ESPERANTO

KOBOLDO

Pluventus.

Super la kvietiginta tero sopiras senluma nokto, En la kamparo eksilentas la lastaj sonoriletoj. Blekas ĉe ankoraŭ ne enstaligita ŝafaro.

En la kameneto de mucida kabano krakas fajraĉo. Paŝlisteto, envolvita per burnuso, tajfas klabon.

— Kie vi estis hodiaŭ? — al li sin turnas la maljuna Anĝelo, pstante tabakon sur tuko.

— Liĉo kondukis la ŝafojn preter la fontanoj kaj mi iris al vilaĝo... La korto estas malbarita, la grenujo preskaŭ sinkis

— Dezerta loko! Bele estis tie, sed mia pli granda filo pereis en la milito, la malgranda, via patro, ankaŭ ne restis viva — ĝemas avo Anĝelo kaj, emociita de la rememoroj, rakontas:

„— Malantaŭ la vilaĝo subiradis prin-tempa suno. Mi trapasis la ponteton kaj malascendis al la fontanoj. Knabinoj, jen kun junuloj, jen kun vektoj kaldronojn surŝultrintaj, intime intersviĉadis. Apud la vasko fraŭloj sin aspergadis per akvo, ŝercis. Ĉiuj ridis Inter ili estis Georgo, gaja, fortega.

„Unu vesperon, rampintaj sur la pajlan tegmenton de la terdometo, liaj kamaradoj ekpafadis kaj ekkriis. Li estis surdorsiginta fraŭlinon. Ŝia fratino, firme ŝin kaptinta, ploris, ne volis cedi. Tial li ekportis ambaŭ fratinojn.

„— Nu, filo, vi portas du novedzinojn! — lin renkontis mi ĉe la sojlo.

„Rido, kantoj. Ĝojadis la junuloj. Ĉu ili konjektis pri turmento kaj doloroj? Ĉu ili sciis, ke persekutas ilin suferoj?

„Kiam Georgo iris en kamparon kun la grego, la paŝtistoj lin faligis teren kaj tretadis:

„— Lin sufoku! Li havas la plej belan edzinon en la vilaĝo!

„Ekrapis aŭtunaj nebuloj. Necesa estis ligno, ja venos longa vintro. Ĉirkaŭe mankas eĉ arbusto. Oni pretiĝis iri al la montaro. Georgo ankaŭ jungis ambaŭ bubalojn en peza baroĉo. Ekgrincis la ŝarĝitaj veturiloj tra la kota vojo. Ĉe la intermonto ilin atingis la nokto.

„— Kiu enverŝos freŝakvon el la puto apud la ŝtonkrucoj?

„— Ni povos satigi nian soifon, se la koboldo ne estas kolera. Ja oni delonge ne estas oferbuĉinta ŝafidon super la akvo kaj pastro ne estas ĝin incensinta!

„— Babilado! Mi iros! — diris Georgo kaj malsupreniris en la valon. Apenaŭ li kliniĝis por ĉerpi akvon — kaj jen ĉenego ektintis sur lia kolo. Post frapo sur la nukon li falis sur sian vizaĝon. Liaj kamaradoj lin prenis kaj alportis en lian baroĉon. Stertorante li baraktis kaj graŭlis senkonscie:

„— Petko, kie estas la ĉenego? Ĝin prenu, fraĉjo!...“

»La karavano travadis la riveron, proksimiĝis al la fontanoj, sed...“

— Ĉu la putinkubo estas lin mortiginta? — interĉesigas la paŝtisteto.

— Iu el liaj kamaradoj murdis lin, kaj ne la koboldo! — emfazas avo Anĝelo kaj ĵetas stumpon al la fajrangulo. —

Petko, lia plej fidela kunulo, fariĝis poste edzo de via patrino kaj ĉe mi vi, kara nepo, restis tre malforta orfeto...“

En la ĉambretaĉo ekestas silento. Ekstere bojas la moloso. La pluveroj ankoraŭ pli obstine frapas la makulitan vitron de la fenestreto, sole flagretanta en la teda mallumo.

Vasil Kretev
v. Altimir

MEMUAROJ DE MALNOVAJ ESPERANTISTOJ

Mia unua vizito en Belgrado

En la komenco de 1909. Mi estis en la ardo de mia esp. korespondado. Multe mi skribadis, nek tempon nek monon mi ŝparadis kaj multon mi ricevadis. El ĉiuj flankoj de la terglobo alfluadis poŝtkartoj, leteroj, presaĵoj. Ĉien, trans maroj kaj montoj al novaj horizontoj, flugadis, promenadis mia spirito kaj alportadis al mi la amikecon, la noblecon de la homa naturo. Eĉ el la plej malproksimaj teranguloj. Granda, sed ne plena estis mia ĝojo: mankis al mi esp. skribaĵo el najbara lando *Serbujo*. Mi aŭdis, ke iu S-ro Jovanoviĉ en Kragujevac aŭ Kruŝevac eldonis esp. lernolibron en serba lingvo. Do, devis esti esperantistoj en tiu lando. Sed en neniu el la multaj tiam de mi ricevataj esp. gazetoj mi trovis adreson de samidean(in)o el tiu frata lando. Maloftaĵo kiel kvarfolio ĝi estis.

Kaj iun tagon, en februaro 1909, oni ne povas prezenti al si mian junulan ĝojon, kiam mi tralegis en „Amerika Esperantisto“ sub „Deziras korespondi“ la adreson de iu Siniŝa Budjevac en Belgrado. Al kiu sekso ĝi apartenis, mi ne sciis, sed, laŭ la finaĵo de la antaŭnomo, ŝajnis virino. Tiel opiniis ankaŭ nia rusa samideano kaj esp. akademiano s-ro Nikolaj P. Evstiféjev, kiu tiutempe loĝis en Sofia kaj al kiu mi rapidis montri mian „malkovron“. Ni tuj skribis al samidean(in)o Siniŝa. Post nelonge ni ricevis tre afablan respondon en bona Esperanto kun klarigo, ke Siniŝa estas juna studento en ia Belgrada universitato kaj

verkanto de la „Certigujo“ por ne tre klaraj por serboj esp. vortoj. Tio estis bonvena por ni ambaŭ — S-ro Evstiféjev kaj mi. Estiĝis regula interkorespondado kaj en la fino de Marto, saman jaron ni estis invititaj pasigi la Paskajn festotagojn kiel gastoj de fratoj Siniŝa kaj Miĥaj Budjevac en Belgrado. Nepriskribbla estis mia ĝojo, despli ke tio estus mia unua vojaĝo eksterlanden kaj mi senpacience atendis la tagon de nia forveturo.

Kaj jen ni ambaŭ, en la komenco de Aprilo, en la serba ĉefurbo. Aro da gesamideanoj frate akceptis kaj akompanis nin ĉie: fratoj Budjevac, fraŭlinoj Milica Djuriĉeva, Zorka Zahieva, Natalia Milanoviĉ, s-roj Andonoviĉ, Nenadoviĉ, Petroviĉ k. a. Ili aranĝis por ni akceptojn, vizitojn, amuzvesperojn, ekskursojn. Kien ne kondukis min kaj kion ne montris al ni tiuj afablaj kaj gastamaj slavaj fratoj! Eĉ la hazardo helpis nin kaj prezentis nin al la tiama kronprinco Aleksandro en Topĉidere... Fine ili aranĝis grandan publikan kunvenon en la Belgrada universitato, kie ni devis paroladi kun propaganda celo. Ankoraŭ sonas en miaj oreloj la humorplenaj vortoj per kiuj Siniŝa prezentis nin: „Se vi volas ruson jen, se vi volas bulgaron jen, se vi deziras grandan viron jen, se vi deziras malgrandan viron jen (kaj li montras sinsekve s-ron Evstiféjev kaj min), sed ili ambaŭ estas junaj, ĉar por la spirito kaj la koro ne ekzistas maljuneco, ili ambaŭ

estas bonaj, ĉar ili estas veraj slavoĵ, ili ambaŭ estas fidindaj, ĉar ili estas fervoraj esperantistoj, unuvorte elkoraj kaj fidelaj slavaj kunfratoj-samideanoj...“ Li ne preterlasis rakonti ankaŭ nian perpoŝtan interkonatiĝon kaj la embarason pri lia virinŝajna antaŭnoma.

La paroladojn de s-ro E. kaj de mia nia humorplena gastiganto tradukis serbe. Granda ŝajnis la interesiĝo de la publiko kaj ne malgranda estis la ĝojo de nia rusa samideano kaj la mia, ke ni sukcesis iom antaŭenpuŝi la movadon, pri kio la loka gazetaro tre favore raportis.

Neforgesebla restos por ĉiam en nia memoro la malnova bona tempo pasigita en la tiam malgranda slava najbarlando, en vere frata medio, kie ĉirkaŭprenoj kaj kisoj ne mankis — slava kutimo.

Mi vere ne imagis al mi tiel varman gastamecon, tiel sinceran manifestadon de slava kaj esperanta frateco...

En la somero de la sama jaro mi estis feliĉa revidi ambaŭ Budjevacojn kune kun areto da najbarlandaj gesamideanoj

en Bukureŝto dum la unua esp. kongreso en Rumanujo.

Lastan fojon mi revidis ilin en Belgrado, revenante de la jubilea esp. kongreso en Krakovo 1912, ĉiam viglaj, gajaj, komplezemaj. Spite la blovon de proksimiĝanta uragano ni plifortigis nian esperon en la bono.

Komenciĝis la Balkana milito. Pasis la dua. Ekplodis la Eŭropa... Pli bone ni ne parolu pri tiu malluma tempo de hombuĉado. Tro funebra ĝi estas por ni, pacaj batalantoj: dum ĝi, en la nigra 1917, forpasis — ho ve! — nia karmemora Majstro, poste Siniŝa Budjevaco, la fidela amiko kaj animo de la serba esp. movado, kaj preskaŭ samtempe nia brava amiko Nikifor Ĥristoskov, la modela redaktoro de „Danubo“... Eternan memoron pri ĉiuj karaj militviktimoj!

Ĉu fine la najbaraj kaj aliaj popoloj komprenos, ke la plej bona fortikaĵo inter ili estas ilia amo kaj amikeco — la vera bazo de la tiom alsopirata tutmonda paco?!

Ivan H. Krestanov, L. K.

Kioma estas la horo?

Se vi vojaĝas per danuba vaporŝipo, vi havos la maloftan okazon admiri ne nur mirinde-pitoreskajn naturbelaĵojn sur ambaŭ bordoj de la rivero, sed ankaŭ la kosmopolitan amason da vojaĝantoj, apartenantaj al diversaj klasoj kaj nacioj. En ĉiu angulo de la ŝipo vi aŭdas fluan interparolon en naciaj lingvoj, kvazaŭ sur tiun naĝantan insulon kolektiĝis la tuta mondo. Sed ĉiupaŝe inter diversnaciuloj vi aŭdas ankaŭ balbuton en fremdaj lingvoj. Por kompreni sin, la vojaĝantoj uzas ridindajn gestojn, movojn kaj mimikojn. La sama naĝanta insulo rememorigas al vi pri la Babela turo.

Observante tiun kompatindan amason, subite en via genia cerbo naskiĝas genia ideo — vi inventas rimedon por helpi la vojaĝantojn en lingva rilato. Vi decidu dediĉi vian tutan forton kaj energion al la efektiviĝo de unu bonfaro, per kiu vi ŝanĝos la fizionomion de la mondo. Per via magia rimedo vi faros la naciajn

lingvojn superflujaj, vi skuos la universon, vi unigos la homaron. La malamikoj ekvivos en paco, de Paris ĝis Peking ekzistos unu homaro, parolanta unu lingvon, kaj la tero, naĝanta en feliĉo, rulos en la senfinaj ĉielaj spacoj. En via sana imago vi vidas, ke tiu ĉi simpla rivera ŝipo, estonta trofeo en la muzeo de la filantropoj, estas la historia nesto, en kiu vi kovis la altvaloran verkon; ke la hodiaŭa tago estas la unua de via proksima gloro...

Tamen... tamen kun bedaŭro via bulgara moŝto estas informita, ke en sia aĝo via genia ideo depasis 200 jarojn kaj ke iu doktoro realigis ĝin antaŭ duono da jarcento. Eĉ sur la sama ŝipo kelkaj vojaĝantoj portas ĝin en sia koro kaj sur sia lango. Ĝi ekzistas ne en la mondo de la revoj, sed reale, kaj ĝi fariĝis la kaŭzo de la ĉi suba konfuzo, kies viktimo estis mi.

En Majo 194... mi faras mian trian

danuban vojaĝon de Wien al Vidin. Ne-konante la nacian apartenon de tiu aŭ alia vojaĝanto, mi kredis, ke mi povas senĝene kaj fide preparoli aferojn en ajna lingvo sen ia supozo, ke la apuda staranto povus kompreni kaj meti min en ridindan situacion.

En malfrua vespera horo nia ŝipo eniris en la havenon de Budapest. Miloj da lampoj speguliĝas en la kvietaj akvoj de Danubo. La nokta panoramo estas kvazaŭ fragmento el la nereala mondo de la ĉarmaj fabeloj. La ŝipo haltis kaj multnombra amaso da vojaĝantoj invadis ĝin. Grandparte tio estis bulgaraj ekskursantoj, pri kies nombro da 150 personoj ni estis jam avertitaj.

Subite alia bulgaro havis alian genian ideon: ke ni okupu niajn lokojn kuŝante, kaj ŝajne dormantaj. Unuanima decido sekvis la proponon.

Alvenas unu post la aliaj la bulgaroj, rigardas timeme ĉirkaŭen kaj, konstante, ke dormantoj okupis ĉiujn lokon, foriras. Estis nur du aŭ tri liberaj lokoj, kiujn unuopaj ekskursantoj provus okupi, sed la 10-jara filo de mia bulgara sam-


FAMAJ VERKOJ DE LA BULGARA PENTRARTO



Vasil Stoilov

Knabino

FAMAJ VERKOJ DE LA BULGARA PENTRARTO



Vasil Stoilov

Vilaĝa vivmaniero

vojaĝanto gardis ilin per krioj jen en franca, jen en germana lingvo: C'est occupé! C'est occupé! Hier ist besetzt! Hier ist besetzt!

Fine du familiaj paroj sin instalas. La unua estis bulgara kaj la alia — hungara.

— Vi ne povis imagi kiel laca mi estas, diris en bulgara lingvo la juna edzino. Feliĉe ke ni trovis tiun ĉi angulon.

Ili eliris el siaj korboj panon kaj kolbasojn kaj komencis frandeme maĉi, rakontante al si la impresojn de la hungara ĉefurbo. Ili klaĉe komentaris la dumnoktan konduton de tiuj aŭ aliaj bulgarinoj, citante iliajn nomojn. Poste en duonlaŭta voĉo ili pritraktis la trompmetodojn, kiamaniere kaŝi siajn aĉetaĵojn ĉe la dogano.

De tempo al tempo, por kaŝi nian naciecon, ni ekparolis en franca, germana aŭ ĉeĥa lingvo. Sendube, ĉi tie mankas bulgaroj, kio ja pravigis la konkludon de la edzo:

— Ŝajnas al mi, ke ĉi tie ni estas la solaj bulgaroj!

— Mi tre ĝojas! respondis kontenta la edzino, kudrante netranĉitan jupon el plej kara silka ŝtofo.

— Vi trompas vin! malkaŝis sin la patrino de la knabo, kiu konstante kriante gardis la liberajn lokojn.

— Vidu! Kia agrabla surprizo! ekkriis la junaj geedzoj. Ankaŭ aliaj bulgaroj!

Fine ni ĉiuj malkaŝis nin, metante finon al la gaja komedio.

La tempo rapide forpasis. Estis jam la 1-a pmn. Ni kuŝas sur niaj litoj, improvizitaj el la kanapo kaj tolseĝoj. Apud mi kuŝas la hungara paro. Ili mallaŭte parolas. Post kvar litoj kuŝas la bela kaj babilema samideanino Grafka, revenanta el Praha. Bondenzirante al mi la pacan dormon, ŝi aldonis en Esperanto,

ke, se oni juĝas laŭ la mildaj interrilatoj de la junaj gehungaroj, dormantaj sub unu kaj sama kovrilo, oni povas diri, ke tio estas vere feliĉa familio.

— Tio ja estas nenia familio, respondis mi, ĉar, observante iliajn fingrojn, mi rimarkis nenan signon de familio...

— Mirindaj estas la moroj en la okcidentaj landoj! konkludis filozofie samideanino Grafka kaj endormiĝis.

La hungaroj silentis.

Je la 5 h. matene, vekigante, mia najbaro, la hungaro, demandis min an flua Esperanto:

— Permesu, samideano! Se mi ne trompas min, vi havas horloĝon, kioma estas la horo, mi petas?

Miaj fortoj ne sufiĉis por respondi. Mi sentis min kvazaŭ dronanta en la akvojn de la blua Danubo...

Cydra

Parolado al la blindaj esperantistoj

Okaze de la Zamenhofa festo en la Domo de la blindaj knabinoj (29. III. 1942.)

Karaj geamikoj,

Mi estas kortuŝita ĝis larmoj okaze de via hodiaŭa festo. Unue — pro la nobla idealemo, kiu inspiras vin ĉiujn en la nuna maltrankvila kaj hipokrita epoko; due — pro la entuziasmo kun kiu partoprenas la feston multaj el miaj studentoj en la Ŝtata muzikakademio, kies muzikan talenton mi delonge konas, sed pri kies aparteno al la Esperanto-movado mi apenaŭ hodiaŭ eksciis kun vere agrabla surprizo; kaj trie — pro la bonega plenumo de via programo, atestanta pri vi ne kiel pri hazardaj amatoroj, sed kiel pri veraj artistoj kun valoraj indivi duaj ecoj.

Hodiaŭ mi ankaŭ dezirus esti blinda... por ne vidi la honton de la civilizacio kaj la mizeron de la milionoj da homoj! Ofte la blindeco estas ne difekto, sed avantaĝo: ĝi ebligas ke oni direktu la rigardon internen, al la fonto de la kreo-povaj energioj. Ja Homero estis ankaŭ blinda, sed li vidis plej klare el ĉiuj okul-sanaj „vidantoj“ la psikan vizaĝon de siaj herooj kaj la kaŝitan sencon de la

historiaj okazaĵoj. Beethoven estis surda, sed per sia interna aŭskultado li aŭdis la plej delikatajn sonojn de la muzika regno. La interna vidado kaj aŭdado estas multe pli valora ol la ekstera.

Certe, vi ne rimarkas la eksterajn formojn de viaj kunuloj; vi ne havas ideon pri la koloroj de iliaj vestaĵoj aŭ pri la trajtoj de iliaj vizaĝoj; vi ne vidas iliajn korpojn — sed vi vidas iliajn animojn. Vi sentas iliajn emojn kaj dezirojn, iliajn purajn esperojn kaj noblajn kortremojn. Vi ne rimarkas la grimacojn sur la vizaĝoj de la fariseoj kaj hipokrituloj, sed vi klare vidas la idealemon kaj la altajn aspirojn de la esperantista popolo. Vi ne devas esti malfeliĉaj, se vi ne povas observi la malbonon de nia kompatinda mondo kaj la teruraĵojn de nia tera infero — ĉar vi vidas la belan sonĝon de la homaro kaj la pitoreskan imagon de la estonteco. Ne ĉagrenu, se vi estas blindaj por la trompaj eksterajoj de la materiaj objektoj: vi ne vidas la *realecon* de la malbono, ĉar vi vidas la *efektive-*

con de la amo, de la vero kaj de la espero. Kial do rigardi la abomenaĵojn de tiu ĉi transira historia epoko? Estu felikaj, ke vi ne rimarkas la „bonfarojn“ de la nuntempa „kulturo“, la larmojn de la patrinoj, la sangon de la martiroj. Ĉar vi vidas la verdan aŭroron de la nova epoko, la unuajn radiojn de la nova esperantista kulturo, la unuajn simptomojn de la nova homaro.

Vi havas animajn okulojn, per kiuj vi povas rigardi al la profundaĵoj de via konscienco kaj vidi tie vian plej altan idealon kaj vivcelon — la idealon kaj la vivcelon de ĉiuj veraj esperantistoj. „Simile al stelo en nigra ĉielo“, ĝi montras al vi la vojon de la vivo. Ĝi donas la direkton de via estonta agado.

Ĝuu do vian internan vidadon! Ankaŭ ni, „vidantoj“, ofte bezonas fermi niajn fizikajn okulojn kaj ekrigardi profunde en niajn animon, se ni deziras ekvidi pli klare nian idealon, la plej altan celon de nia ekzistado. Ni bezonas nin enŝlosi en ni mem kaj fermi la „fenestrojn“ de nia animo ĉiam, kiam ni volas komuniki kun la mondo de niaj plej noblaj pensoj kaj plej altaj esperoj. Ĉar la videbla mondo fatale distras nin per siaj trompaj vidaĵoj aŭ teruraj bildoj kaj deflankigas nian atenton, malhelpante ĝin

koncentriĝi al la sola direkto de nia homarana celo.

Nome tiu ĉi interna vidado, donante forton al via senhezita kredo kaj fervoro por la esperantista idealo, instigis vin al tia entuziasma kantado kaj deklamado. La esperantaj himnoj kaj aliaj muzikaĵoj, kiujn vi plenumis tiel sincere kaj belarte, atingos la korojn de ĉiuj esperantistoj kaj akcelos nian triumfon pli efike ol multaj pompaj paroladoj kaj prelegoj. Ĉar la muziko tuŝas rekte la animojn kaj inspiras ĉiujn verajn idealistojn, instigante ilin al laboro kaj sinofero, al batalo kaj al heroeco sur la fronto de la nova kulturo. Per viaj belaj kantoj vi povas fariĝi la plej grandaj aktivigantoj de nia movado, ĉar nenio tiel spontane vekas la entuziasmon de niaj pioniroj, kiel la kantado de esperantaj himnoj. Via nobla rolo de *inspirantoj* devas doni profundan sencon al via vivo. Tia destino ne estas kompatinda, sed enviinda. Ĉar ĝi estas la destino de ĉiuj spiritaj gvidantoj kaj klarvidaj profetoj de la homaro.

Daŭrigu, do, vekadi la esperantistan entuziasmon ĉe la verda pacarmeo — kaj vi plenumos la plej utilan kaj la plej noblan mision, kian homo povas plenumi dum sia tera ekzistado!

D-ro St. Ĝuĝev

VIZITU BULGARUJON!

Varna — la regino de la Nigra maro

Varna situas en pentrinda golfo sur la bordo de Nigra maro kaj estas kovrita de verdaĵo. Ĝi havas purajn stratojn, per tilioj ambaŭflanke ornamitajn bulvarojn, moderan kaj agrablan klimaton kun meza temperaturo somere 21°C. La temperaturo de la marakvo estas de 15—28°C. La nombro de la loĝantoj estas 80,000.

Varna posedas modernajn aranĝojn por varmaj kaj malvarmaj marbanoj, kiuj okupas spacon da unu kilometro laŭlonge de la marbordo. Granda valoro estas tie la belega plaĝo kun pura kristala sablo, kiu dum somertagoj varmiĝas ĝis 60°C. Ĉarma parko, unu kilo-

metron laŭlonge de la bordo, kun ombraj aleoj kaj florgardenoj.

Ne malpli bela kaj alloga estas la ĉirkaŭaĵo de Varna. Proksime (7 klm.) estas la palaco „Evksinograd“, somera reĝa restadejo, al kiu kondukas ŝoseo meze de vinberejoj kaj ĉarmaj vilaoj. La monaĥejoj „Sveti Konstantin“ kaj „Alaĝa“, la lago de Devnja, la arbaro „Pejnergik“ kaj multaj aliaj rimarkindaj lokoj prezentas la urbon kiel elektive agrablan kaj neanstataŭebla ripozejo kaj somerrestadejo.

Aparte rimarkinda estas la monaĥejo „Alaĝa“, kiu estas simple enĉizita en la

roko. Sed malsupre de la monaĥejo oni trovas vidaĵon ankoraŭ pli rimarkindan: Laŭlonge de la marbordo, je kelkaj kilometroj, etendiĝas ora, etgrena sablo, brila kiel la sunradioj. Oni nomas ĝin „La ora sablo“. Super ĝi altiĝas ĉarma valo kiu etendas sin ĝis sorĉravaj rokoj. Ĉio estas neimageble bela, riĉa, freŝa, bunta kaj vivega. Nenie aliloke ekzistas tia abundeco de belegaj vidaĵoj arigitaj en unu lokon.

En Varna oni povas sukcese kuraci plej diversajn malsanojn. La vivkondiĉoj, kiel ĉie en Bulgarujo, estas tre moderaj.

En daŭro de kelkaj lastaj jaroj Varna aperis kiel preferata somerrestadejo ne nur de bulgaroj, sed ankaŭ de rumanoj, ĉeĥoj, poloj k. a. Oni ŝatas ĝin kiel la plej belan kurortan lokon en Sudorienta Eŭropo kaj de jaro al jaro ĝi estas pli kaj pli vizitata dum la somera sezono, daŭranta de majo ĝis oktobro.

TRIBUNO DE LA PIONIROJ

NIA MOVADO

Forpasis jam proksimume du jaroj de kiam la bulgaraj esperantistoj ne havas la eblecon kolektiĝi je regula nacia kongreso, por ŝanĝi pensojn pri nia forpasita asocia agado kaj prepari planon por estonta agado.

Dume la milito foriozas ĉie en la mondo, entrepreni ian konsiderindan laboron estas ne eble. Nenia kultura kaj asocia agado en tiuj ĉi alarmaj tempoj estas ebla, nek eĉ pensebla. La plej malgranda faraĵo por nia Esperanto-movado estos tamen utila por ni ĉiuj.

La artikolo „Pri nia organo B. E.“ de s-no Iv. Bataklijev („B. E.“ j. XXIII — 1—2) estas ĝustatempa, kaj ĉiuj ni devas preni noton de la donitaj konsiloj. Same la artikolo (bulgarlingva) „Alvoko al la bulgaraj geesperantistoj“ de la redaktejo de „B. E.“ estas ĝustatempa. Do se ni ne deziras ĉeson de nia organo, ni devas tuj kolektadi abonojn por ĝi kaj tiamaniere asekuri ĝian regulan aperadon.

Nia revuo havas lertan, spertan kaj talentan redaktoron. Kun siaj ĉefartikoloj li gajnis la korojn de ĉiuj bonaj esperantistoj, kaj ni devas subteni kun niaj ĉiuj

fortoj la inĝenieron de la paca linio „Esperanto“. Li meritas laŭdon kaj plenan subtenon.

S-no Belĉo Todorov (Oktomvrijski), longjara sekretario de „BEA“, meritas ankaŭ laŭdon kaj subtenon. Li laboras senĉese kaj senbrue por nia enlanda movado. Li donis sian luksan laborkabineton por ejo de sofiaj esperantistoj, por sidejo de la C. K. de „BEA“ kaj renkontejo de ĉiuj provincaj esperantistoj; ĉar la klubo de la Sofia esp. societo estas luigita. Multaj Esperanto-asocioj envias al la sidejo de nia C. K. de „BEA“. Eĉ la hungaraj esperantistoj ne povas esti fieraj kun simila centra sidejo.

Ankaŭ meritas kuraĝigon s-no Ivan Esperov, eksredaktoro de la Esperanto-paĝo de ĵurnalo „Zarja“. Ĉar nun Esperanto-paĝo ne plu aperas, li eldonis novjaran propagandan folion bulgarlingve. Li ĉiam kaj ĉie estas bona propagandanto de Esperanto.

Gesamideanoj! Ĉu ni devas resti surdaj al la supre cititaj alvokoj? Se ni deziras, ke nia movado ne disfalu kaj ke ni ne perdiĝu en la mallumo, ni ne lasu nian LUMTURON estingiĝi!

Ivan K. Vasilev

NIA VIVO

Enlanda kroniko

Plovdiv. Konsiderante la pezajn kondiĉojn, en kiuj nia movado disvolviĝas, kaj kompare al aliaj lokoj kaj societoj, niaj gesamideanoj estas tre viglaj.

Dum la vintro ni multfoje vizitadis komune la teatron. Ni ĉiuokaze uzas kaj praktikas nian belsonan lingvon.



Samideanoj el diversaj lokoj sur monteto „Bunargik“ (Plovdiv).

Okaze de la foiro, ni havis plezuron konatiĝi kun multaj s-anoj, venintaj en nian urbon el diversaj urboj kaj vilaĝoj, por vidi la ekspozicion de la printempa internacia foiro, aranĝatan ĉiujare en Plovdiv. Niaj ges-anoj akompanadis la gastojn montrante al ili la vidindaĵojn de la urbo.

La plej kara inter la gastoj, por ni, estis s-ano d-ro St. Ĝuĝev el Sofio, redaktoro de nia revuo. Kun li ni pasigis kelkajn neforgeseblajn horojn. Neniam ni forgesos la francan historieton pri Donogo, rakontita tiel bele kaj majstre de li, en bona Esperanto-stilo.

Responde al la alvoko de la redakcio de „Bulgara Esperantisto“, dum mallonga tompo ni kolektis kaj sendis la sumon por 50 abonoj. La kolektado daŭras.

De la novjara Esperanto-folio ni disvastigis 230 ekzemplerojn. Senpacience ni atendas la Printempan „Esperanto-folion“ kaj aliajn Esperanto-eldonaĵojn.

M. Bataklieva

Pazarĝik. En la kolonoj de „BE“ sub la rubriko „Nia vivo“ delonge oni nenion legis pri nia movado en Pazarĝik. Eble oni pensus, ke en nia urbo jam Esperanto-movado ne ekzistas. Post apero de la leĝo pri la diplomitaj lektoroj, kaj precipe post la eksplodo de la milito, ni, la esperantistoj en Pazarĝik, prenis decidon, nenian publikan propagandon entrepreni por Esperanto ĝis la fino de la nuna krizo. Anstataŭ gajni novajn adeptojn por nia movado, ni riskas renkonti malamikojn.

En tiuj-ĉi alarmaj tagoj, kiujn nun travivas preskaŭ la tuta homaro, nia unua tasko devas esti subtenado de nia organo „B. E.“. (Ni havas pli ol 50 abonantojn de „B. E.“ ĉiujare). Due, ni klopodu konservi niajn fortojn. Ni esperas, ke baldaŭ venos pli feliĉaj tagoj, kiam ekregos vera paco en la mondo. Tiam ankaŭ ni, la pazarĝikaj esperantistoj, denove aperos sur la scenejo.

Ivan K. Vasilev

V. Opâlĉenec, Ĉirpan. Dum la pasinta vintro kelkaj junuloj en nia vilaĝo fervore lernis Esperanton. Iuj el ili jam korespondas kun bulgaraj kaj eksterlandaj samideanoj. Ni kolektis monon kaj aĉetis kolektive esperantajn librojn por perfektigi en la lingvo. Dum dimanĉoj kaj festotagoj post la peza kamparana laboro, ni renkontiĝas kaj ekzercas Esperanton. Dum la someraj labortagoj ni intencas organizi volontulan laborservon por akiri monon. Tiamaniere ni fondos esperantan bibliotekon.

K. T. Kirev

V. Galiĉe, Orehovo. La agado de la Esperanto-grupo „Verda pioniro“ en nia vilaĝo daŭras pli aŭ malpli vigle — laŭ la laborsezono. Plej bone ni agas, kiam la lernantoj kaj studentoj revenas en la vilaĝon. La partoprenantoj de la preĝeja ĥoro estas preskaŭ ĉiuj esperantistoj. Kiam la ĥoranoj kunvenas, ili kantas, parolas kaj legas en Esperanto.

Dum la Pasko oni preĝis en Esperanto.

La unuan tagon de Pasko, posttagmeze, kiam la preĝejo estis plena je lernantoj, instruistoj kaj vilaĝanoj, pastro Konst. Pironkov tralegis en Esperanto kelkajn versojn el la Sankta Biblio. Ĉiuj restis



La esperantista grupo en v. Gallice kun pastro Pironkov.

kontentaj. Post la diservo kelkaj lernantoj sin turnis al la pastro, petante helpon por lerni Esperanton. Ĝis nun pastro Pironkov gvidis kelkajn kursojn.

Murgin—Canko

Tra revivigita Makedonia vojaĝis dum la Paskaj festoj nia samideano Iv. H. Krestanov. Li vizitas Kriva Palanka, Kumanovo, Skopie, Veles, Prilep, Bitolja kaj ĉie, precipe en Prilep, trovis samideanojn. Notinde estas, ke en Ohrid la regionestro s-ro Kosta Nenĉev estas bona esperantisto.

Sadovo. Samideanoj povas sin turni al s-ro Boris Karabelov, lernanto en la VIII klaso, kaj, en lia foresto, al s-ro Bogomil Ŝumanov, lernanto en la VII klaso de la Agrikultura gimnazio, kie ĉiam ekzistas speciala akceptoĉambro por gastoj.

Sofia. La samideanoj en Sofia forte tenas la verdan standardon. Preskaŭ ĉiusemajne ili renkontiĝas. Dum la foiro en Plovdiv, multaj sofiaj esperantistoj estis gastoj de la plovdivaj samideanoj, kaj ankaŭ renkontiĝis kun esperantistoj el aliaj lokoj. Oni sin preparas por la sezono de la ekskursoj.

Tre viglaj estas la blindaj esperantistoj.

Je la fino de ĉiu jaro, la lernantoj de la Instituto por blindaj geknaboj organizas tradician literatur-muzikan amuzaĵon esperantan. Ankaŭ tiun ĉi jaron niaj blindaj samideanoj preparis belegan programon. La 29-an de Marto ili organizis literatur-muzikan amuzaĵon, tre bone vizitatan.

Per kelkaj bonvenaj vortoj, la aranĝanto de la amuzaĵo, la fervora blinda s-ano Dimo Kolev, lektoro de Esperanto en la Instituto, malfermis la amuzaĵon. La festo, dediĉita al Zamenhof, okaze de la datreveno de lia morto, komenciĝis per la solenaj sonoj de nia himno esperantista, kantita de la blindula geknaba ĥoro. Sekvis kantoj, duetoj, deklamaĵoj, muziko kaj legado el „La vivo de Zamenhof“.

Pli ol du horojn ni ĝuis la belegajn Esperanto-voĉojn de niaj blindaj samideanoj. Kiel trankvile ripozas la subpremata homa animo en tiu ĉi paca rondo familia, for de la malpaca homaro!

— Meritas laŭdojn ĉiuj partoprenintoj: s-ro Miĥ. Kaŝamiĥajlov — pianisto, f-ino Stefka Bakarĝieva — kantistino (ambaŭ gestudentoj en la Ŝtata Muzikskademio), f-inoj Tanja Ruseva, Genka Nikolova, Vetka Nikolova, k. a.

S-ano V. Oljanov gratulis la partoprenantojn pri la bonsukcesa laboro. S-ro Ĉuĝev ankaŭ kuraĝigis ilin per kelkaj laŭdaj vortoj. Laste parolis s-ro Iv. Esperov kiu skizis planon por praktika laboro.

Saŝa Iv. Esperova

Printempa Esperanto-renkontiĝo.

En Plovdiv, dum la foiro 1940. okazis granda oficiala Esperanto-konferenco, tre bone vizitita. Tiam oni decidis okazigi ĉiujare dum la foiro oficialajn Sudbulgarajn konferencojn. Tamen la milito malhelpis la realigon de la decido. Tiun ĉi jaron esperantistoj el Plovdiv invitis siajn korespondantojn kaj amikojn viziti ilian urbon kaj esti iliaj gastoj. Tiamaniere la 6-an de aprilo posttagmeze jam alvenis multaj s-anoj el diversaj partoj de la lando. Ni grupe promenis ĝis la „Monumento de la liberigintoj“ sur la monto Bunarĝik, kie ni fotografis nin. Dum la

tuta promenado ni interparolis ĉiam en Esperanto kaj kantis esperantajn kantojn. Poste ĉiuj ni ope faris viziton al la familio de samideano Stoicev, kiu, malgraŭ sia progresinta aĝo, kortuŝis nin per sia gastamo, fervoro kaj junula entuziasmo. Tie ni kantis la himnon „La Espero“. Sekvis kantoj, deklamoj kaj diskutado de kelkaj demandoj pri nia movado. Vespere, kelkaj samideanoj el Sofia faris viziton al la malnova esperantisto s-ro Penko Stoev, partopreninto de la unua universala kongreso en Boulogne sur mer. Samideano Stoev estas veterano de nia movado kaj havas grandan meriton por ĝia prospero en Plovdiv.

Ni disiĝis gajaj, kontentaj kaj entuziasmigitaj por plua Esperanto-agado.

Niaj gastoj estis multaj s-anoj el Sofia, Banki, Harmanlij, v. Opalĉenec, Peŝtera, Pazarĝik, Kumanovo, Asenovgrad kaj aliaj lokoj.

Dim. G. Ivanov

Bracigovo (Peŝtera). Nia junularo interesiĝas multe pri Esperanto. Ĝi havas kontakton kun s-anoj el Peŝtera. En la urbo estas ankaŭ kelkaj maljunaj s-anoj, kiuj laboris por nia ideo. Multaj el ni korespondas kun eksterlandaj kaj enlan-

daj esperantistoj. Tiuj ĉi faktoj estas ĝojgaj. Ni daŭrigos nian laboron.

K. Gjul.

Peŝtera. La lernado de Esperanto en nia urbo ne ĉesas. Kelkaj samideanoj jam estas progresintaj kaj korespondas. Dum la printempo ni organizos komunajn promenojn kaj ekskursojn. Ofte ni renkontiĝas kun esperantistoj el la proksimaj vilaĝoj Batak kaj Kamenica, kun kiuj ni preparolas diversajn priesperantajn demandojn.

Nia grupo por korespondado „Flamo de la verda stelo“ senĉese laboras. Ni ricevis multajn leterojn kaj adresojn el eksterlando.

Ni korespondas kun Francujo, Hungarujo, Svedujo, Hollando, Kroatujo, Hispanujo kaj Italujo. Multaj el ni partoprenas la Albumo-adresaron de s-ro D. Ivanov — Ruse. Ni kolektas abonojn por „Bulgara Esperantisto“, ĉar tio estas nia unua devo. Ĉi tie ni disvendis 50 ekzemplerojn de la „Novjara Esperanto folio 1942“. Ĝi faris grandan propagandon kaj instigis novajn simpatiantojn lerni la lingvon.

Tiel ni antaŭeniras al bonsukceso kaj hela estonto.

St. Z. Kukuŝev.

BIBLIOGRAFIO

Tra la Esperanto-gazetaro

En „**Esperanto**“ de U. E. A. № 491 (1) s-ro H. Kürsteiner skribas: „Estas unu el la noblaj trajtoj de nia movado, ke ĝi devigas respekti anon de alia nacio aŭ de alia raso, de kio kondukas la vojo al pli alta ŝtupo, al tiu ĉi grandioza maksimumo: amu vian proksimulon... Tio ĉi estas la ideo bazo de nia movado... Niaj kontraŭuloj sentis pli bone ol ni mem tiun ĉi forton de *ideo* en nia movado. Kaj anstataŭ malkuraĝigi min, tiu ĉi sinteno malamika fortigu nin en nia batalo, ĉar ĝi konfirmas la ekziston sur ideo bazo de nia movado. Venkas ideo, sed ne perforto aŭ, kiel diris Napoléon, *la ideoj estas pli fortaj ol la kanonoj.*“

En „**Cirkulero**“ de H. K. E. S. (Jan.—Februaro) d-ro Francisko Erdej sub novjara titolo „Novaj tempoj — novaj zorgoj“ instigas al vigla laboro: „... Ni de-

vas esti pretaj al pli grandaj oferoj kaj malhelpaĵoj pro la ĉiam pli mallarĝigitaj cirkonstancoj kaj eblecoj. La vivo fariĝas ĉiam pli mallaraĝa, pli malfacila. Tamen ni ne malesperu! Ni ne kredu, ke ĉio estas perdita... Kontraŭe... Dum ni spiras, ni esperu, kaj ni agadu, laboru vigle, senlace!“

En la sama numero de „Cirkulero“ estas presita la unua parto de la parolado, kiun la sama fervora s-ano faris okaze de la naskiĝa tago de Zamenhof: „Jes, la tago de Zamenhof estas simbolo de unueco! En ĉiuj societoj, en ĉiuj movadoj oni devas kunlabori, ĉar *sen organizita laboro, oni ne povas esperi sukceson.* Sed en nia societa vivo, en nia movado kaj akcelado estas multe pli necesa tiu ĉi kunlaboro organizita por la komuna celo, ol en ceteraj!“

Iv. D. Esp.

Esperanto-periodaĵoj ricevitaj

Nin ĝoigas kaj kuraĝigas la regula ricevado de kelkaj Esperanto-gazetoj eksterlandaj. Nome:

Cirkulero — sciigilo por anoj de la Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo, Januaro—Februaro 1942, 16 paĝa. Enhavo: Novaj tempoj — novaj zorgoj! — de D-ro Fr. Erdej; Letero el urbo Pécs — H. Fiedler; la amuzo estu honesta! — de P. Fr. Zsiros; Esperanto insulo — de V. Todoroff. La Esperanto-kunlaboro — parolado de d-ro Fr. Erdej. Adreso: Budapest V. Géza str. 4, Hungarujo.

Esperanto — de UEA (Universala Esperanto-Asocio) n-ro 491 (1), Januaro—Marto 1942, 38-a jaro. Enhavas: La idea bazo de nia movado — de H. Kürsteiner; Raporto pri la helpo al familio Zamenhof; Amu vian proksimulon — eltiro el romano de Er. M. Remarque; Esperanto dum la tutmonda milito kaj la internaciaj organizaĵoj — de Hans Jakob;

Informoj de U. E. A., k. a. Adreso: Palais Wilson, Genevo, Svislando.

Svenska Esperato-Tidningen — La Espero. XXX jaro, n-ro 3 de Marto 1942. Enhavas artikoloj kaj sciigojn en sveda kaj esperanta lingvoj pri la esperantista enlanda kaj eksterlanda movado. Adreso: Box 689, Stokholm 1, Svedujo.

Nia parolilo — loka Esperanto-gazeto, eldono de la esperantista klubo de A. B. F. (Svedujo). № 3, Marto 1942, 12-a jaro. Enhavo: Nia lingvo kaj la du militoj — ĉefartikolo; Esperantaj jarkunvenoj; Voĉoj el eksterlando; versaĵo, humorajo, krucvortenigmo k. a. Adreso: E. Ekström, Linnegatan 38, Göteborg, Svedujo.

E. I. A. R. — Romo. Radio-programo de ĉiuj italaj radiostacioj. Enhavas interalie sciigon pri la Esperanto-disaŭdigodum Marto kaj Aprilo 1942. La samideanoj el la ceteraj landoj estas petataj sendi salutleterojn por instigi la Esperantoj disaŭdigojn.

Deziras korespondi

S-ro Kurt Lindström, *Agnesberg*, Svedujo. Dez. korespondi pri ĉia temo per l. p. k., inerŝ. p. m.

S-ro Jozsef Somogyi, Megyeri ut. 14/16, *Pécs* — Hungarujo — 16-jara, korespondas kun studentoj.

S-ro Bror Lundström, Tegnérgatan 56, *Limhamn*, Svedujo — studrondo dez. korespondantojn.

S-ro A. Védrine, 2 rue Rüplinger, *Lyon* 4, Francujo. Nepre respondas.

Saŝa Ivan Esperova — str. Pirov 48 — *Sofia* — Bulgarujo — por esp. kor. grupeto.

S-ro Szalay Sandor, Kender — u 39, *Budapest* VIII.

S-ro Szathamary Sandor, Delej — u 49, *Budapest II* — Hungarujo, pri sociaj problemoj.

S-ro Joaquim Joao de Lagos Junior, Estrada de Lagos, *Portimao* — Portugal.

S-ro Dimitar G. Ivanov, str. „Lozengrad“ 10, *Sofia* VIII, dez. k. pri ĉ. t.

F-ino I. Berssehins — *Eksjo*, Svedujo.

F-ino Anio C. Vorman — Hoefhád 628, *Hago*, Nederlando.

F-ino Elsa Persson, Sigridsro 2. — *Bodeno*, Svedujo.

F-ino Asta Fredri Ksson, Bereol 192, *Finspang*, Svedujo.

F-ino Miks Márta, *Budapest* VIII. — Luiza utca 22, Hungarujo.

Адресът на списанието е:

„Bulgara Esperantisto“, ул. Царь Калоянъ 20, София.